

Adam Krieger, Nun sich der Tag geendet hat	Adam Krieger, Nun venis de la tago fin'	Adam Krieger, La tago iris jam de ni
	<i>tradukita de Manfredo Ratislavo</i>	<i>tradukita de Wolfram Diestel</i>
Nun sich der Tag geendet hat Und keine Sonn' mehr scheint, Schläft alles, was sich abgematt Und was zuvor geweint.	Nun venis de la tago fin', Ne lumas plu la Sun', Dumtage laciginte sin La homoj dormas nun.	La tago iras jam de ni, ne lumas plu la sun'. Plorinte lacaj, ĉiuj ĉi trankvile dormas nun.
Nur ich, ich gehe hin und her Und suche, was mich quält, Ich finde nichts als ungefähr, Das was mich ganz entseelt.	Nur mi, mi ĉirkaŭiras sen Ripozo tie ĉi, Ne trovas mi la kaŭzon jen De la melankoli'	..... ..... ..... .....
Ihr Sterne hört zwar meine Not, Ihr helft mir aber nicht, Denn euer Einfluß macht mich tot Und blendet mein Gesicht.	Mizeron mian vidas vi, Sed vi ne helpas min, Vi steloj alte super mi, Mortigos min je l' fin'.	..... ..... ..... .....
Du Schöne bist in Schlaf gebracht Und liegst im stiller Ruh, Ich aber geh die ganze Nacht Und tu kein Auge zu.	Ekdormis vi jam, belulin', Trankvile kuŝas vi. Malkvietigas io min, Ĉirkaŭe iras mi.	En harmoni' vi dormas jam, ho, kara belulin'. Sed dum la nokt' sopira am' iradi faras min.
Erhöre doch den Seufzerwind Der durch die Fenster weht, Er sagt dir, wie du mich entzünd't, Und wie es mit mir steht.	Ekaŭdu la sopiron vi, Ho kara sinjorin'! Ĝi diras, kiel fartas mi, Ke vi flamigis min.	Suspiro blovas, aŭdu ĝin, tra la fenestr' al vi, fluŝtrante, ke vi ravis min, kaj kiel fartas mi.
Bist du der Ursprung meiner Pein, So such' ich bei dir Rat, Durch dich kann mir geholfen sein! Ach, tu es in der Tat.	Se estas vi la origin' De tiu ĉi sufer', Mi petas, ke vi helpu min. Ah, faru ĝin en ver'!	..... ..... ..... .....
Indessen habe gute Nacht Du meine Lust und Pein O wenn du morgen aufgewacht, So laß mich bei dir sein.	Ripozu dum la nokto nun, Permesu vi al mi, Se ree lumos hela Sun', Ke estu mi ĉe vi.	Vi bonan nokton havu nun, sufer' kaj ĝu' de mi! Post la apero de la sun' komune estu ni!
...	...	...

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas ADAM KRIEGER (\*1634-01-07 – †1666-06-30), publikigita 1667.

Arg-307-620 (2013-01-31 13:26:43)

Pri la aŭtoro vidu: [http://de.wikipedia.org/wiki/Adam\\_Krieger](http://de.wikipedia.org/wiki/Adam_Krieger). La teksto de la unua strofo estas identa al la unua strofo de la kanto n-ro 478 de la germana evangelia kantlibro. La restaj strofoj de jena religia kanto estas verkitaj de Johann Friedrich Herzog (1647 - 1699), krome de la oka. La nereligia versio troveblas en <http://www.volksliederarchiv.de/text851.html>.

Traduko de la Germana poemo “Nun sich der Tag geendet hat” de ADAM KRIEGER (\*1634-01-07 – †1666-06-30) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2005-04.

MR-436-1 / Arg-307-622 (2013-01-31 12:16:30)

La melodio estas aŭdebla en <http://www.ingeb.org/spiritua/nunsichd.mid>.

Traduko de la Germana poemo “Nun sich der Tag geendet hat” de ADAM KRIEGER (\*1634-01-07 – †1666-06-30) en Esperanton de WOLFRAM DIESTEL (Volframo Distel’).

Arg-307-623 (2005-05-03 13:20:37)